

# BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher  
Eisenbahner - Esperantisten im Bundesbahn - Sozialwerk





Bulteno

Numero 2

marto/aprilo 1990



**Nia jarkunveno '90 en Spa (belgaj Ardennoj) 1a ĝis 7a de oktobro 1990**



**Bildoj: solcress B-4880 Spa**

## Nachruf

### Gernot Ritterspach verließ uns für immer.

Am 13. 1. 1990 ist er von uns gegangen. Unterwegs mit seiner Gattin zur IFEF-Skiwoche verstarb er unerwartet und plötzlich im Zug. Sechs Tage später gaben ihm neben Angehörigen und Kollegen viele GEFA-Mitglieder aus dem Bundesgebiet und als Vertreter der IFEF-Delegiertenversammlung Lucien de Sutter aus Brüssel das Geleit. Im Namen von IFEF und GEFA und für seine vielen Esperanto-Freunde fand Joachim Gießner bewegte Worte in der Friedhofskapelle. Der Tod Gernot Ritterspachs ist für die Eisenbahner-Esperantisten eine Tragödie. Er ist schlicht nicht zu ersetzen in seiner Vielseitigkeit und Hilfsbereitschaft. Seit 1956 war er ununterbrochen führend in der Fachwörterarbeit tätig. Kurz vor seinem Tode konnte er noch die Erfüllung seines Traumes erleben: er konnte im IFEF-Kongreß in Salou das soeben fertiggestellte Eisenbahn-Fachwörterbuch mit mehr als 10 000 Begriffen vorstellen, das er mit den Mitarbeitern des IFEF-Fachwörterausschusses in jahrelanger, ehrenamtlicher Arbeit geschaffen hatte. Es war die Krönung seines Esperantolebens. Und es soll hier auch daran erinnert werden, daß er es war, der 1966 das 2000 Fachwörter



Gernot Ritterspach

umfassende kleine Wörterbuch Deutsch-Esperanto-Deutsch herausbrachte, das dann für viele andere Länder als Vorbild diente.

Es ist einfach unmöglich, die 35jährige Tätigkeit Ritterspachs mit Worten zu würdigen. Einen Nachruf seines engsten Mitarbeiters Dieter Hartig finden Sie nachstehend eine ausführliche Würdigung im „Internacia Fervojisto“ 2/90.

Wir haben einen Freund verloren, den wir nie vergessen werden. Seine Gattin Elisabeth hat ihn ein Leben lang begleitet. Sie wird ihn am meisten vermissen. Wir wünschen ihr, daß sie diesen Schicksalsschlag überwinden möge und den Weg zu seinen Freunden, die ja auch ihre Freunde sind, immer wieder finden möge.

Joachim Gießner

## Nekrologo

### NI ĈIUJ KULPAS!

diris konsilanto de la sindikato en sia funebra parolado.

Ni funebras pri

## GERNOT RITTERSPACH

Mi ne povis ne plori, ankoraŭ nun, skribante tiujn liniojn, mia koro ploras.

Ni ĉiuj kulpas!

Gernot kaj mi estis intimaj amikoj. Ni agis kune en la Terminara Komisiono kun granda plezuro kaj ĝojo. Ni kontaktis per tre ofta telefonado.

Mi ĉiam senpacience atendis tiun interparoladon kun Gernot. La terminaraj aferoj ja estis aranĝitaj per kelkaj frazoj. Sekvis la amika babilado. Jen mi eksciis, per kiom da laboro li estis ŝarĝita! Li neniam plendis, sed li energie agis, kvazaŭ li antaŭsentis sian sorton.

Li korektis kaj verkis senĉese ion por iu, helpis la redaktorojn aŭ agis por niaj kongresoj, por la skisemajnoj - li aranĝis preskaŭ ĉion! La fakprelegojn li ĉiam profundege traktis. Sen nombraj gazetartikoloj kaj raportoj estis el lia plumo. Li estis ŝarĝita multflanke, sed neniam li rifuzis helpon.

Ni do ĉiuj kulpas!

Mi demandas min, kial nur kelkaj membroj en nia movado aktivas?

Tial kulpas ankaŭ tiuj, kiuj nenion faris.

Lia kara edzino turmentis sin, kial li tiel streĉe laboris por Esperanto, kial, ŝi meditis, KIAL?

Mi trovis la solan respondon: Ĉar li, same kiel Zamenhof, dediĉis sian tutan forton al la granda ideo, kies venkon li ne povis travivi.



Gernot RITTERSPACH restu en nia memoro, ĉiam!

Ni daŭrigu lian aktivecon, por ke lia klopodo por Esperanto ne estis vana.

Al lia kara edzino, Elisabeth Ritterspach, mi kore deziras, ke ŝi retrovos la internan pacon kaj forton daŭrigi la vivon en nia rondo.

Dieter Hartig

## Nekrologoj

Ni devas priplendi la morton de fidelaj membroj el nia Esperantomovado en distrikto Essen

Jam en oktobro 1989 mortis nia multjara membro

**Heinrich Ladage (56),**

el Recklinghausen. Li lernis Esperanton jam 1948 kaj estis fidela membro en tiu longa tempo. Li aplikis Esperanton regule dum sia tuta vivo

En februaro 1990 forpasis

**Helga Knötzsch**

el Hagen, 62 jara. Helga Knötzsch estis dum multaj jaroj kune kun sia edzo tre aktiva kaj helpema en la klubvivo kaj vizitis multajn kongresojn kaj renkontiĝojn. Ili ripozu en paco.

Bedaŭrinde denove forlasis nin tre fidela membro de nia distrikto Kolonjo, nome:

**Heinrich Ross,**

naskita 6.3.1908, mortinta 28.2.1990.

Jam 1928 li komencis lerni Esperanton kaj tuj post la milito li fariĝis membro de GEFA/IFEF. Multajn IFK li vizitis, i.a. Helsinki, Stockholm, Verona, Stock on Trent, Hamar, Maribor kaj ankaŭ kelkajn UEA-kongresojn. Dum multaj GEFA-JV li ofte partoprenis. Li estis dum multaj jaroj tre aktiva Esperantisto.

Ni neniam forgesos nian fidelan amikon kaj membron!

Kondolencadreso: Familio Edmund Ross, Brückeweg 8, 5102 Würselen.

Iu travivaĵo de Heinrich Ross:

Dum la Hitler-periodo Esperanto en Germanio ja estis malpermesata. Kelkaj Esperantistoj en la distrikto Aachen tamen renkontiĝis en la kadro de la katolika junularmovado. Lutage kelkaj SA/SS-viroj volis kontroli la personojn de la renkontiĝo en la junulardomo. Sinjoro Ross diris al iu Esperantisto kelkajn vortojn esperantlingve. Aŭdinte tion la gvidanto de la SA/SS diris en la tipa Aachener-tamen: „Loß uns john, he sin Usländer dabei“. Esperante: Lasu nin iri, ĉi tie ankaŭ estas eksterlandanoj.

Herlitze

## Danĝero!

Legu atente tiujn sobrajn vortojn pri danĝera situacio, en kiu troviĝas nia germana fervojista asocio. Kvankam mi jam de jaroj en miaj jarraportoj regule avertis pri danĝero kaj petis la helpon de ĉiuj membroj, por eviti serverajn sekvojn, tiu helpo neniel realiĝis. Jen mi nomu nur du ciferojn, kiuj sufiĉas, por klare montri la evoluadon de la danĝero: la nombro de niaj individuaj membroj intertempe ŝvebas ĉirkaŭ 400, la membroperdo dum la pasintaj dek jaroj entute estis proksimume cent. Tamen tiu neniel kartakterizas la kompletan amplekson de la danĝero. Aldoniĝas la daŭra kaj malagrablega kreskado de la kvoto de emerituloj. El tiu fakto devige rezultiĝas pli kaj pli da perdoj pro morto. Aliflanke klopodoj, interesigi homojn, precipe junulojn, por nia afero, apenaŭ montris rezultojn.

Ni ĉiuj ĝojegis, kiam pasintjare la frukto de longtempa laborego maturiĝis en formo de nia nova terminaro, en kies pretiĝo la du germanaj kolegoj Ritterspach kaj Hartig fortege partoprenis. Sed ni aŭdu la vortojn de Hartig, kiu demandas: Kion utilos la terminaro, se en dek jaroj apenaŭ iu ekzistos, kiu povus uzi ĝin? Certe ne necesas aldoni ion al tiuj vortoj. Sed necesas ekserĉi vojon por kontraŭstiri.

Jam ofte la kaŭzoj por la indiferenteco de la homoj rilate al la Internacia Lingvo estis traktitaj. Bonvolu legi pri tio en la jarraportoj de la pasintaj jaroj (ĉiam en Bulteno n-ro 5). Ni povas transformi nek la homojn nek la vivkondiĉojn de tiu mondo. Sed ni povas adapti niajn metodojn al la metodoj de tiu mondo.

Ni, la asocio GEFA, klopodos baldaŭ helpe de nova informilo kaj helpe de informado en la DB-Bulteno vastskale varbi kaj informi inter la fervojistaro. Sed ĉio estos vana, se ne aldoniĝos la kunagado de nia membraro. Jam ĉiam persona argumentado estis unu el la plej efikaj rimedoj por konvinkado. Ĉio estos vana, se nia membraro opinias, ke sufiĉas la streĉado de manpleno da bonvolemaj „funkciuloj, kiuj tiras la vagonon“, kaj la aliaj fidas al tiu tirado. Varbu, informu ĉie ajn, ĉiam ajn. Petu senkostajn informilojn ĉe viaj distrikt-komisiitoj (Bezirksbeauftragte).

En tiu horo de vera danĝero mi tial atentigas **vin ĉiuj** pri via respondeco. Ne forgesu, ke esti esperantisto signifas ne nur utiligi la lingvon por si mem kaj ĝui ĝin, sed same signifas kontribui al a daŭra vivo de nia lingvo. Sed **vivi** lingvo nur povas, se ekzistas homoj parolantaj ĝin. Antaŭ 80 jaroj niaj kolegoj kreis la germanan fervojistan Esperanto-movadon. Ĝis nun multnombraj sindonemaj gekolegoj sukcesis

vivteni ĝin. Ni komune zorgu, ke ĝia vivo daŭru. Giessner

### 31a IFES en Sand in Taufers

13a ĝis 20a de januaro 90

La 3an fojon en la historio de IFES okazis internacia fervojista Esperanto-skisemajno en Italio. 42 sportemaj Esperantistoj el 7 landoj renkontis sin en la hotelo Drumlerhof en Sand in Taufers (Suda Tirolo) por skii, promenadi kaj ferii.

Sed bedaŭrinde atingis nin jam komence de la skisemajno la terura informo, ke nia bona amiko Gernot Ritterspach survoje al Sand in Taufers subite mortis.. Tiu grava sortobato malĝojigis ĉiujn partoprenintojn kaj influis ankaŭ la humoron.

berg“ estis bone preparitaj. Duonhore trafikis la skibusoj al la valstacioj de la seĝoliftoj. Niaj skiantoj uzis la okazon de matene ĝis posttagmeze por skii.

Ankaŭ la skivojoj por la skikurado estis bone spurigitaj en Rein, sed bedaŭrinde pli malfacile atingeblaj per busoj. Pro tio preferis la plej multaj el ni la migradon. Preskaŭ ĉiutage gvidis nia amiko Jan la karavanon al Ahornach, Kasern, St. Johann, Foiro Bruneck, kaj akvofaloj. Multvariaj kaj distraj ankaŭ estis la vesperaj programoj. Hilaire kontribuis per muziko preskaŭ ĉiutage kaj prezentis filmon pri la pasinta skisemajno en Mühlbach (Aŭstrio). Sepp Weidacher kaj Fritz Hilpert montris lumbildojn pri Leningrado kaj Brazilio. Impresplena kaj unika estis la vespera promonado kun torĉoj al la Kastelo. Tra la karnevala vespero gvidis nin tri tirolaj muzikantoj. Ili ludis por ni



Foto: V. Röder

Ĉe la interkonatiĝa vespero ni povis saluti nian italajn gastojn, D-ro Bolognesi kaj kolego Molesini, kiuj vizitis kaj subtenis nin per multaj pokaloj kaj donacoj por la premioj. Kun la vetero kaj neĝo ni havis grandan feliĉon. La skitereno „Speikboden“ kaj „Klaus-

popularan dancmuzikon. La plej bonaj maskoj estas premiitaj. Niaj du knabinetoj Manuela kaj Viviane ricevis eĉ la unuan premion. Kiel ĉiujare ni ankaŭ okazigis diversajn konkursojn. La premiojn gajnis: slalomo, virinoj I: Hapi-Fosso Denise, Pinet Therese. virinoj II:



Scharf Marg., Röder E. Viroj I: Scharf Franz, Scharf Hans, Mortensen Erik. viroj II: Schäfer Willi, Weidacher Sepp, Knuchel Charly. Skikurado, grupo I: Kiefer Egon, Vonay Josette, Gross Jacques. grupo II: Happi-Fosso Hilaire, Weidacher Hedwig, Hilpert Vitoria. Piedira konkurso: Collet-Deloyer Eugène, Niemann Jan, Dugue Jos. Lingva konkurso: Collet-Deloyer Eugène, Vonay Josette, Hervouet Marie-Denise.

La IFEF-premion ricevis Vonay Josette.

Menciinda estas ankaŭ la vizito de la deligito de la Itala Esperantista Federacio d-ro Simari kun la edzino vendredon vespere. Ili atentigis nin pri la utilo de la organizaĵo „Pasporta Servo“: Ankaŭ informis kaj invitis nin niaj francaj amikoj al la venonta IFES en les Contamines-Montjoie. Apartan dankon al ĉiuj, kiuj helpis al ni ĉe la preparo kaj bona funkciado de IFES 90.

Vitus Röder

## Aus den Bezirken und Gruppen

### Bremen

La 13an de decembro festis la grupo denove la feston por memoro pri Zamenhof en agrava kaj familia rondo en bele ornamita salono.

La 21an de marto Hellmut Grebe prelegis pri „La rolo de kristanismo“.

La 19an de majo okazos la tradicia maja ekskurso.

### Essen/Münster/Westfalen

La 27. - 29. 4. okazos en la BSW-ĉambro de la centralstacidomo, trako 21 intensivkurso. Ananco al: W. Brandenburg 02504/8360 aŭ al R. Fischer 02573/626 kaj al G. Brandenburg per Basa 944/852/1312.

### Frankfurt/Main

#### Dr. Krause aus Leipzig in Frankfurt

Die Esperanto-Gesellschaft Frankfurt am Main verschob ihre obligatorische Mitgliederversammlung um einen Monat, um Herrn Dr. Erich-Dieter Krause aus Leipzig zu einem Vortrag über seine Arbeit auf dem Gebiet des Esperanto einzuladen. Ebenso beteiligte sich die BSW-Esperanto-Gruppe Frankfurt mit einer Delegation an dieser Veranstaltung. Am 1. Februar 1990 berichtete der Referent vor einem aufmerksamen Zuhörerkreis, die Grundlage für seine Wörterbucharbeit sei eine umfangreiche Sammlung gängiger Begriffe in der derzeitigen Esperanto-Literatur, in Zeitschriften und sonstigen Veröffentlichungen.

Hiervon sei in den bisher in der DDR erschienenen Wörterbüchern aus wirtschaftlichen Gründen leider nur ein Teil enthalten. Grundsätzlich, so Dr. Krause, solle bei Übersetzungen das klassische Zamenhof-Esperanto ohne Neuschöpfungen angewendet werden, jedoch seien auch Neologismen im Zuge der Weiterentwicklung der internationalen Sprache vielfach vorzuziehen. Dies gelte auch für bestimmte Fachgebiete. Hier erwähnte der Referent besonders die Aktivitäten der Eisenbahner-Esperantisten, die im vergangenen Jahr zur Herausgabe eines Fachwörterbuchs als Anlage zu einer amtlichen internationalen Ausgabe geführt hätten.

Dr. Krause, der als anerkannter Sprachforscher an der Universität in Leipzig lehrt, hofft daß sich die geplante Herausgabe seines Wörterbuchs Esperanto-Deutsch in absehbarer Zeit verwirklichen läßt. Nach einer lebhaften Diskussion, vor allem über die Chancen des Esperanto in unserer anglophil geprägten Welt versprach der Referent einen weiteren Vortrag zu gegebener Zeit.

Wilh. Barnickel

### Köln

Der Bba lädt alle Mitglieder mit Familienangehörigen und Freunden zur diesjährigen Frühlingswanderung am 5. 5. 1990 rund um den Ölberg im Siebengebirge ein.

Wir treffen uns um 10 Uhr im Bahnhof Königswinter. (Ankunft der Züge aus Richtung Koblenz um 10.04 Uhr, aus Richtung Köln um 9.59 Uhr).

Mit dem Bus fahren wir zur Margarethenhöhe, wandern ohne große Anstrengungen auf einem schönen Rundweg um den Ölberg (ca. 60 Minuten) und kehren dann im Hotel Margarethenkreuz zum Essen ein.

Nachmittags haben wir noch Gelegenheit, in Königswinter Kaffee und Kuchen zu genießen. Freuen wir uns auf einen schönen Frühlingstag und auf ein gesundes Wiedersehen!

Wer in Königswinter eventuell übernachten möchte — in Bonn und Umgebung findet die Großveranstaltung „Rhein in Flammen“ statt — kann sich beim Bba dafür anmelden.

### Korekto

En la artikolo „Hamar - urbo de la 42a IFEF-kongreso“ (BULTENO n-ro 1/1990) necesas la sekvaj korektoj:

- la kongresejo troviĝas en la urbodomo (ne en la apuda hotelo Victoria),
- la vizitota fervojmuzeo situas apud la kongresurbo Hamar (ne en la loko Løten),
- la filatelista klubo de Hamar rezignis la eldonon de speciala koverto.

## KULTURA ESPERANTO-DOMO

**Kastelo Grésillon,  
F-49150 Baugé, Francio**

Tel. 41891034, 40767795 - poŝt-  
konto: MCE Nantes 148529 P  
Bankkonto: BPBA Nantes  
5801902570 9

### Kulturaj aranĝoj 1990

#### Praktika formado de Esperanto- Instruantoj:

prezento de diversaj metodoj — teo-  
riaj kaj praktikaj konsiloj

#### Samtempe: Internacia renkonto de infanoj:

kursoj, redaktado de staĝgazeto,  
promenadoj, distraĵoj

**De la 11-a posttagmeze ĝis la 20-a  
de aprilo matene**

**Internacia amika renkonto** Nedevi-  
ga programo: kursoj, gvidata kon-  
versacio, komunaj promenadoj kaj  
ekskursoj, distraĵ vesperoj

**De la 15-a de junio ptgm ĝis la 2-a  
de julio matene**

**Prelegoj kaj kursoj** Serio de diver-  
stemaj prelegoj, kursoj por divers-  
lingva lernantaro, gvidata konversa-  
cio, ekskursoj, distraĵ vesperoj

**De la 2-a ptgm ĝis la 16-a de julio  
matene**

**Lernu kaj praktiku I** Kursoj por di-  
verslingva lernantaro, gvidata kon-  
versacio, ekskursoj, distraĵ vesperoj

**De la 17-a ptgm ĝis la 31-a de julio**

**Lernu kaj praktiku II** Kursoj por di-  
verslingva lernantaro, gvidata kon-  
versacio, ekskursoj, distraĵ vesperoj

**De la 1-a ptgm ĝis la 15-a de  
aŭgusto**

**Somera Lernejo** Kursoj por divers-  
naciaj lernantoj, „la arto traduki“  
(dua semajno), gvidata konversacio,  
ekskursoj, distraĵ vesperoj

**De la 16-a ptgm ĝis la 31-a de  
aŭgusto**

**Petu detalajn informojn ĉe la su-  
pra adreso**

## Eisenbahner-Esperanto-Kongreß in Norwegen

Nach Auskunft der norwegischen Kollegen  
stehen für die Anreise nach Hamar folgende  
Zugverbindungen zur Verfügung:

	A	B	C
Hamburg Hbf	7.03	15.23	19.18
København H	12.10	20.50	—
København H	12.15	21.15	—
Oslo S	21.58	7.01	12.45
Oslo S	22.55	7.55	12.55 14.55
Hamar	0.39	9.21	14.49 16.41

#### Bemerkungen zu A

Sitzwagen 1./2. Kl. Hamburg - Oslo

Sitzwagen 2. Kl. Oslo - Hamar

#### Bemerkungen zu B

Sitz- und Liegewagen 2. Kl. Hamburg - Oslo

Schlafwagen 1./2. Kl. Hamburg - Oslo

#### Bemerkungen zu C

Liegewagen 2. Kl. und Schlafwagen 1./2. Kl.

Hamburg - Oslo; kein Sitzwagen

Für die Rückreise werden folgende Züge vor-  
geschlagen:

	D	E	F
Hamar	5.20	13.39 14.50	20.49
Oslo S	7.08	15.07 16.39	22.17
Oslo S	7.35	17.00	23.00
København	17.24	—	8.54
København	17.40	—	9.15
Hamburg Hbf	23.04	8.33	14.34

#### Bemerkungen zu D

Sitzwagen 1./2. Kl. Oslo - Hamburg

#### Bemerkungen zu E

Nur Liegewagen 2. Kl. und Schlafwagen 1./2.

Kl. Oslo - Hamburg

#### Bemerkungen zu F

Sitzwagen 1./2. Kl., Hamar - Oslo;

Sitz- und Liegewagen 2. Kl. sowie Schlafwa-  
gen 1./2. Kl. Oslo - København

#### GEFA-Zeitschriften-Zeitungsarchiv:

Aus organisatorischen Gründen bitte ab sofort  
keine Zeitungen, Zeitschriften, Mitteilungen  
anderer Landesverbände und dgl. an Egon  
Kiefer, BSA 600 Frankfurt, AA 341 senden.  
Verleih ist ebenfalls nicht mehr möglich.



## Neuerscheinung

GEFA bietet erneut Fachliteratur in Esperanto an. Nach dem Erscheinen der übersetzten CIV, die die vertraglichen Regelungen für die internationale Beförderung von Personen und Reisegepäck enthält, gibt es jetzt auch die entsprechende Ausgabe für den internationalen Güterverkehr (CIM). Die Übersetzung lieferte unser GEFA-Mitglied Wilhelm Barnickel. Die Revision lag in den Händen der inzwischen leider verstorbenen Mitglieder Ritterspach und Dr. Brodt. Die CIM, die wie die CIV vom Internationalen Eisenbahntransportkomitee in Bern herausgegeben wird, gilt für die europäischen Eisenbahnen und bestimmte Schifffahrtlinien, ferner für einige afrikanische und asiatische Bahnen. Die Esperanto-Ausgabe der CIM eignet sich besonders als Geschenk für ausländische Sprachfreunde.

Titel: Unuecaj reguloj por la kontrakto pri la internacia fervoja transporto de varoj (CIM). Format: A 5 (hoch); Umfang: 91 Seiten; Kartografiert. Preis einschließlich Versandkosten 9 DM. Lieferung gegen Vorauszahlung auf das Girokonto der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten 953 729 bei der Sparda-Bank Frankfurt (M), BLZ 500 905 00, über Karl Bernhard, Sauerbruchstr. 8, 6700 Ludwigshafen (EDS: Bf 6800 Mannheim Rbf).

GEFA

## El la Fervoja Mondo

### Hotelvagonaro

La Internacia Fervoj-Unio (UIC) aprobis la koman planon „hotelvagonaro“ de la aŭstraj, germanaj kaj svisaj fervojoj (ÖBB, DB, SBB) konstrui tute novajn vagonojn por la nokta trafiko. Ĉiu kupeo de la duetaĝaj vagonoj estas klimatizata kaj ofertas du litojn kaj seĝojn, telefonon, vekhorloĝon, sekurfakon, minifridejon, duŝon kaj necesejon. Krom tiu kategorio „luko“ ekzistas la kategorio „komforto“, same en duetaĝaj vagonoj. Po kvar personoj disponas unu kupeon kun aparta lavejo. Apud la pordoj de la vagonoj troviĝas po du necesejoj. La tria vagontipo, destinota precipe por junuloj, ofertas niĉojn kun klineblaj litseĝoj. Krome estas disponeblaj kapaŝkultiloj kaj багаĝlokoj. La estontan hotelvagonaron kompletigas aparta servovagono kun akceptejo, restoracio kaj koktelejo. DB intencas mendi 20 hotelvagonarojn, ÖBB 8 kaj SBB 6, kiuj trafikos ek de 1994. Tiu servo ampleksos veturprezon, trankonon kaj matenmanĝon kaj estos vendata je inkluzivprezo.

## Eŭro-tunelo

En 1993 komenciĝos la fervojtrafiko inter Francio kaj Britio tra la Euro-tunelo. Interterpe la belgaj, britaj kaj francaj fervojoj mendis tute novajn trajnojn, nome SNCB 3, BR 14 kaj SNCF 13. La trajnoj estas longaj 393 metrojn kaj havas 18 vagonojn inter du elektraj trakciiloj kaj disponas pri 794 sidlokoj, el kiuj 584 estas duaklasaj. Kun 14 000 kilovatoj da traktiva povo de 25 000 voltoj (alternkorento) la trajnoj povas efektiviĝi komercan rapidon de 300 km/h. La trakciiloj estos konstruataj tiaj, ke ili veturos sur la linioj de SNCB kun 3 000 voltoj (kontinukorento) respektive kun 750 voltoj (alternkorento) sur la brita linio inter la tunelo kaj Londono, sur kies trako la elektra energio estas transmisiata pere de trajnrelo anstataŭ pere de kontaktodrato. Krome la trajnoj devas akordiĝi kun la mezuroj, formoj kaj liberspaca limprofilo. Sep firmaoj okupiĝos pri tiu komplika konstruado.

### Falsigo de biletoj

Jam delonge la fervojoj klopodas laŭeble malhelpi la falsigon de biletoj. Precipe temas pri altprezaj internlandaj kaj internaciaj biletoj, sed ankaŭ pri manskribataj biletkuponoj. Interterpe la kvalito de kopiaparatoj taŭgaj por produkti kolorajn kopiojn perfektigiĝis tiel bone, ke la fervojoj devas nepre reagi. Ekzemple la Germana Federacia Fervojo (DB) presigas sur la biletpaperoj ekstreme maldikajn diverskolorajn filigranojn, kies fotokopioado estas relative bone rekonebla. Krome la biletpapero entenas almiksaĵon, kiu tuj reagis, kiam oni provas forigi la stampon surpresitan de la trajnestro, per farbiĝo. Krom tio necesas speciala elektronika kontrolo de bilestokoj kaj ilia vorvendo por eviti, ke ne uzitaj biletkuponoj estas plenumataj po fari defraŭdojn.

### Biletaŭtomato

La japana fervojkompanio Kinki starigis en la stacio Namba prototipon de biletaŭtomato, kiu kapablas kompreni homajn voĉojn. Por eviti la influon de ĉirkaŭaj bruoj iu sensoro aktivigas la internan sistemon nur, kiam persono alproksimiĝas al la aŭtomato. Ekparolinte la nomon de unu el la 26 destinstacioj de tiu linio kaj enŝovinte la antaŭ aĉetitan magnetkarton, la vojaĝanto povas akcepti la deziritan bileton.

Wilh. Barnickel

### Dezirata korespondi:

Bohumil Kelbel, Na úveze 1220. CS - 295 01 Mnichovo Hradiště, 42 jara, edziĝinta, inĝ. pri komputilaj sistemoj, intereso: muziko, sporto, ĝardeno

# Naskiĝtaga serenado

Mel. Geh' aus mein Herz . . .



laŭ germana teksto de Ruth Bock  
trad. de Joachim Giessner

## Bitte des Schriftleiters:

Senden Sie möglichst druckreife Beiträge zur Veröffentlichung mit 1/2 fachem Zeilenabstand und 1 Durchschrift oder Ablichtung.

## Mitteilungen

Der IFEF-Kongreß 1991 findet vom 11. - 17. 5. in Brno (Brünn) CSSR statt.

IFES richten aus: 1991 Frankreich, 1992 ĈSR  
Redaktfino por n-ro 3/90 estas la 5. 7. 1990

Herausgeber/eldonanto Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks. Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Graß, 8620 Lichtenfels, Sachsenstr. 7, Druck/preso: Druckerei Jungfer, 3420 Herzberg am Harz